

ĈEA-retkomunikoj 2012/03

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

Enhavo:

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO
2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO
3. STARTO 2012/3 APERIS
4. MATERIALOJ PRI LA TRILANDA KONFERENCO EN BŘECLAV (27.-30.9.2012)
5. MATERIALOJ PRI LA 25-A OSIEK-KONFERENCO EN SVITAVY
6. LANĈITAS ĈEĤA ESPERANTA DISKUTEJO
7. NOVAJ ARTIKOLOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ KAJ WWW.MUZEUM.ESPEWRANTO.CZ
8. PLUAJ NOVAĴOJ EN LA MUZEA PAĜO ĈE IPERNITY
9. ANONCO DE LA UEA-ĈEFDELEGITO POR ĈR
10. PLUAJ AKTUALAĴOJ
11. ĈEJ AKTIVAS
12. LISTO DE ARANĜOJ

1. VORTOJ DE LA ĈEFREDAKTORO

Post somero, post trilanda konferenco en Břeclav jam estas tempo. Por kio estas tempo? Do, por nova eldono de ĈEA-retkomunikoj. Kiel tradicie, ankaŭ tiu ĉi eldono estas plena de novaĵoj kaj interesaj ligiloj. Do, agrablan legadon al vi! Kaj jes, ŝparu naturon - se eblas - ne printu tiun ĉi eldonon de ĈEA-retkomunikoj, se ne nepre necesas. Estu amiko kun la naturo!

2. RETKOMUNIKOJ EN PDF-FORMATO

Kiel tradicie, ankaŭ tiu ĉi eldono de ĈEA-Retkomunikoj en PDF-formato elŝuteblas [ĉi tie](#).

Arkivo de Retkomunikoj troveblas [ĉi tie](#).

3. STARTO 2012/3 APERIS

En elektronika formo en PDF-formato vi povas ĝin elŝuti kaj legi klakinte al [ĉi-tiu ligilo](#):



4. MATERIALOJ PRI LA TRILANDA KONFERENCO EN BŘECLAV (27.-30.9.2012)

La historie unuan komuna konferencon de ĈEA, SKEF kaj AEF partoprenis centoj da esperantistoj ne nur el Ĉeĥio, Slovakio, Aŭstrio, sed ankaŭ el Pollando, Germanio, Hungario kaj Brazilo. Ĝenerala raporto kaj fotogalerio kaj videoregistraĵoj ankoraŭ prilaboratas. Tamen jam surrete disponeblas kelkaj gravaj materialoj (en formato PowerPoint) prezentitaj kadre de la programo:



[Zpráva o činnosti ČES od sjezdu v Šumperku a Výhled činnosti a projekty ČES na 2012/2013](#) (Agadraporto kaj agadplano de ĈEA – nur ĉeĥlingve)



Urbestro de Břeclav Oldřich Ryšavý, prezidanto de ĈEA Vladimír Dvořák, prezidanto de SKEF Stano Marček, prezidanto de AEF Bernhard Tuidler dum solena malfermo

[Ĝenerala prezento de ĈEA kaj Bildprezento de Sudmoravia regiono](#)

[Fotogalerio de la okazloko](#) (fotaĵoj el la aranĝo mem ankoraŭ prilaboratas)



Dum ekskurso al Lednice

[Biciklovagoj tra Břeclav](#) (parto de filmo dublita al Esperanto)

[Videoregistraĵo el la folkloro spektaklo](#) (infana ensemblo Břeclavánek prezentiĝis al konferencanoj 28.9.2012)



Folkloro spektaklo dum vendreda vespero

[Karel Čapek - Morto de Arĥimedo](#) (sonregistraĵo el la nova KDo - aŭdigita dum la vendreda kultura vespero)

5. MATERIALOJ PRI LA 25-A OSIEK-KONFERENCO EN SVITAVY

Ĝenerala artikolo pri tiu ĉi grava internacia kultura aranĝo aperis en [Starto 2012/3/72-74](#)



Solena malfermo de OSIEK en Svitavy

Fotogalerio:

[Parto 1](#) kaj [Parto 2](#)

Retligiloj al registritaj kulturaj programeroj:

[Numero 1](#) Lunda koncerto

[Numero 2](#) Merkreda vespero

[Dramo R.U.R. de K. Čapek](#) (14minuta specimeno de la spektaklo)



Dum spektaklo de R.U.R.

[Dramo R.U.R. de K. Čapek](#) (fotogalerio el la spektaklo)

[Mallonga filmeto de M.Gutiérrez pri la aranĝo](#)

[Videoraporto de la regiona televido](#) (ĉeĥlingve)

[Karel Čapek – Aŭguristino](#) (sonregistraĵo de rakonto, parto de la novprezentita kompaktdisko, eldonita (kadre de la aŭdprojekto de ĈEA)



6. LANĈITAS ĈEĤA ESPERANTA DISKUTEJO

La 8-an de oktobro estis lanĉita ĉeĥa esperanta diskutejo je adreso <http://forum.esperanto.cz>, kiu ebligas al ĉeĥaj esperantistoj, sed ankaŭ al publiko diskuti pri multaj aferoj rilate al esperanto. Nuntempe la diskutejo estas nur en ĉeĥa lingvo, sed oni kalkulas, ke ĝi ankaŭ estos en esperanto. Ni antaŭĝojas viajn vizitojn kaj aktivajn kontribuojn!

7. NOVAJ ARTIKOLOJ EN WWW.ESPERANTO.CZ KAJ WWW.MUZEUM.ESPERANTO.CZ

Artikoloj en esperanto:

[Aŭskultu renaskiĝintan "Verdan Stacion"!](#)

[En Prago nun ekzistas haltejo de Zamenhof](#)

[Aktuale pri preparado de la unua Internacia lernejo de Esperanto](#)

[Esperanto sur la oficiala urba retpaĝaro de Břeclav! Peto pri via subteno!](#)

[Forpasis Jiří Vychodil](#)

[Kion vi scias pri estiĝo de Esperanto?](#)

[Fotogalerio el la 6-a Kongreso de Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj](#)

Artikoloj nur en la ĉeĥa lingvo: (pouze v češtině)

[Aperis nova DVD Esperanto elektronike](#)

[Vastigu vian horizonton pri uzado de interreto](#)

[Ni bonvenigas du novajn klubojn](#)

[Ĉeĥa esperanta diskutejo lanĉita](#)

[Rakonto pri estiĝo de Esperanto](#)



8. PLUAJ NOVAĴOJ EN LA MUZEA PAĜO ĈE IPERNITY

Filmetoj:

[„Ruĝa nano“ kaj Esperanto](#) (pri rolo de Esperanto en populara komedia sciencfikcia filmserio)

[Esperanto estas lingvo uzata plurmaniere](#) (la 3-a parto de la DVD „Esperanto estas...“)

[Kiel oni faras argilan vazon](#) (instrukcia filmo pri ceramika metio)

Prelegetoj:

[Mark Fettes – Esperanto-Ideologio](#)

[Miroslav Malovec – Pri Karolo Piĉ en la litomiŝla tombejo](#)



Muziko:

[Tutmonda muziko \(Germanio\) - Esperanto](#)

[JoMo – Kisu min](#)

9. ANONCO DE LA UEA-ĈEFDELEGITO POR ĈR



La ĉeĥaj individuaj membroj de UEA ĉi-jare bedaŭrinde malmultnombriĝis je 17 personoj! Eĉ kiam parte temas pri neinfluebla kialo, nome morto (inter aliaj IM forpasis du honoraj membroj de UEA Eli Urbanová kaj Jiří Vychodil), tamen 11 niaj IM ne reabonis sian membrecon! La kotizoj restas la samaj kiel en pasinta jaro: MA (membro-abonanto, kiu ricevas Jarlibron kaj 11 numerojn de la Revuo Esperanto) kostas 1050 Kč, la membreco de kategoria MJ (membro + jarlibro kaj reta alireblo al la Revuo Esperanto) kostas 420 Kč kaj MG (membro kun gvidlibro, ricevas nur Gvidlibron, t.e. la unuan parton de Jarlibro sen Delegita reto kaj nove ankaŭ tiu havas retan aliron al la Revuo Esperanto) kostas nur 170 Kč. Krome la membroj de kategorio MA kaj MJ havas rabaton 10% mendante librojn en la libroservo de UEA kaj senteblian rabaton aliĝante al la Universala kongreso de Esperanto. Do, karaj ĉeĥaj esperantistoj, pripensu aliĝi kiel individuaj membroj de UEA kaj fariĝi ano de la plej granda kaj plej signifa monda Esperanto-organizaĵo. Kaj vi, kiuj jam estas membroj, bv. pripensi ĉu fariĝi delegato de UEA: ĉu loka por via urbo (se tiu mankas) aŭ faka pri via fako. Pluajn informojn kaj aliĝilojn vi petu ĉe la UEA-delegato por Ĉeĥio Petro Chrdle, rete chrdle@kava-pech.cz.

Venontaj Universalaj Kongresoj de Esperanto

La 98-a Universala Esperanto-Kongreso (UK) okazos en Rejkjaviko ekde la 20-a ĝis la 27-a de julio 2013, la 99-a UK 2014 en Bonaerob (Buenos Aires, Argentino, la dato ankoraŭ ne estas fiksita). Ĉar mi ricevis jam plurajn demandojn, ĉu mi denove aranĝos karavanon al la UKoj mi anoncas, ke mi ne plu agas kial vojaĝagento (krom perado de tranoktoj ĉefe en Prago) kaj mian tempon kaj energion mi fokusiĝas ekde nun nur al mia eldonejo kaj aliaj miaj Esperanto-Aktivecoj (instruado de Esperanto, prelegoj almenaŭ flanke pri Esperanto kaj propra verkado). Tamen, mi volonte konsilos al la interesiĝantoj pri iu el la kongresoj (aŭ pri ambaŭ) kiel akiri favorprezajn flugbiletojn kaj ankaŭ el mia funkcio de la ĉefdelegito kaj peranto de UEA peros aliĝilojn kaj mendojn al la centra oficejo de UEA. Interesiĝantoj turnu vin rekte al mia retadreso chrdle@kava-pech.cz

10. PLUAJ AKTUALAĴOJ

Novaj sondosieroj (elŝuteblaj) de/pri Prof. D-ro Ivo Lapenna en la hejmpaĝo de Fondaĵo Ivo Lapenna okaze de la 125-jara datreveno de Esperanto estas troveblaj [je tiu ĉi paĝo](#).

11. ĈEJ AKTIVAS



(oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) raportas pri sia agado ekde aprilo: Malgraŭ UK kaj IJK en Azio, plej multa agado okazis somere. La Someran Esperanto-Studadon (SES) de E@I en Nitra partoprenis rekorda kvanto de proksimume 25 ĉeĥoj aŭ personoj loĝantaj en Ĉeĥio (kelkaj kunorganizis) inkluzive de Jana HORÁČKOVÁ, gajninto de la konkurso "Lernu Esperanton kaj gajnu eksterlandan vojaĝon", kies elspezojn kovris ĈEJ.

Miroslav HRUŠKA instruis en SET Lančov dum la 1-a etapo. Aŭguste li renkontis ekstendaranojn kaj partoprenis EU-subvenciitan seminarion de Katalin KOVÁTS dum la Itala Kongreso, kiun ĉeestis ankaŭ Jan NAVRÁTIL. La 2-an de junio li partoprenis Muzean nokton en Svitavy.

Marek BLAHUŠ partoprenis EEU-kongreson en Irlando kaj aŭguste vizitis en Norvegio la Esperanto-klubon de Oslo, post hazarda kunveno kun esperantisto en pola flughaveno. Finaŭguste li ĉeestis inaŭguron de ekspozicio "Post triono" en Liptovský Mikuláš kaj laborbrigadon en la esperanto-arĥivo en Plevník.

Vít MIŠUREC kun Vlasta PIŠTÍKOVÁ partoprenis IJS-n kaj antaŭ ĝi kune kun Dan MRÁZEK kaj Jan ŠEBETOVSÝ en Prago aranĝon de E-mentál.

Jam de la 20-a ĝis la 22-a de aprilo en Ostrava kunvenis deko da junuloj, inkluzive de grupo el Vroclavo, germana gasto kaj la novulo Vít PALETTA. Samtempe Marek BLAHUŠ kun Peter BALÁŽ gastis en Budapeŝto antaŭ EU-subvenciita seminario pri retlernado en Kipro kaj ligis kontakton kun tiea ununura esperantisto. En majo Marek interpretis en publika konferenco de EEU en Triesto, kien Jiří GALUŠKA venigis studentan grupon el Prago. Jam mezaprile li ĉeestis Tutslovakian renkontiĝon kaj junio renkontis esperantistan paron en Poznań.

La Brna klubo de ĈEJ kunvenis en tejo "Ora rozo" la 2-an de majo (naŭope) kaj ĵaŭde la 20-an de septembro (okope, inkluzive de itala gasto Pierre CALIARI). Pierre, gastigantino Zuzana KOŽUCHOVÁ, Miroslav HRUŠKA kaj Václav ZOUZALÍK dimanĉe ekskursis al Svitavy, sabate la unuaj tri promenis en Brno kun hundo. La 22-an de aŭgusto revenis viziti Brnon Cesáreo GARCÍA FERNÁNDEZ, kiun akceptis Miroslav MALOVEC kaj Marek BLAHUŠ. La lasta ankaŭ prezentis esperanton en lingvoateliero dum la Nokto de sciencistoj la 28-an de septembro.

Post renkonti esperantistojn en Malto, Martin BUREŠ vojaĝis tra Francio kaj nun studas en Liono. Simile Barbora ZÁVODSKÁ iris studi al Oulu (Finnlando) kaj Jirka GALUŠKA, post mallonga staĝo en E@I, nun studas en Konstanz (Germanio). Vít MIŠUREC iris studi al Italio.

La trilandan konferencon en Břeclav ĉeestis 3 junuloj el ĈEJ, post ĝi juna brazila partopreninto George vizitis esperantistojn en Šumice.

ĈEJ gratulas al sia delonga membro Petr Adam DOHNÁLEK okaze de lia edziĝo okazinta la 18-an de aŭgusto en Šilheřovice (ĉeestis tri esperantistoj) kaj ankaŭ al sia honora membro Max KAŠPARŮ okaze de lia elektiĝo en la parlamenton de Regiono Vysočina la 13-an de oktobro.

Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe <http://cej.esperanto.cz/>

12. LISTO DE ARANĜOJ

La plej proksimaj aranĝoj

ĝis 29-a de oktobro: MIGRA EKSPozICIO „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ - en Kastela grenejo en Žirovnice



2012-10-19/21: [Jarkunveno de ĈEJ en Světlá nad Sázavou](#)

2012-10-26/28: [Konferenco de IFEF en Šumperk](#)

2012-11-01/29: MIGRA EKSPozICIO „Ĉu Esperanto estas morta lingvo?“ - en Urba biblioteko Dačice

2012-11-08/11: [La 1-a Internacia Esperanta Lernejo](#) - en Bartošovice (apud Ostrava)

2012-11-09/11: 2-a BIERo - [Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo](#), organizas ĈEJ kaj E-mentál

2012-11-15/18: KAEST (Konferenco pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko), nunjare denove en Modra-Harmónia, ĉeftemo "Modernaj edukaj metodoj kaj teknologioj", [info kaj aliĝilo](#)

2012-12-01/??: MIGRA EKSPozICIO "Ĉu Esperanto estas morta lingvo?" - en Filozofia Fakultato de Masaryk-Universitato en Brno

2012-12-08: [AnkRo - Antaŭkristnaska renkontiĝo](#). Okazloko en Písek.

2012-12-09: [Marcipana Kristnasko en Svitavy](#), info: dvor.libuse@seznam.cz

2012-12-29: Esperanta Silvestro en Česká Třebová, info: jk.esperanto@seznam.cz

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al retkomunikoj@esperanto.cz. Ne eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

Arkivo de Retkomunikoj troveblas ĉi tie: <http://www.esperanto.cz/eo/cxea-interne/arkivo-de-retkomunikoj>

ĈEA-RETKOMUNIKOJ 2012/3

Kontakto kun ĉefredaktoro: Miroslav Hruška – retkomunikoj@esperanto.cz
Redakta teamo: Petr Chrdle, Pavla Dvořáková, Marek Blahuš